# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

========== LA HOUSSAYE-en-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ============

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières,- PARIS -6-
Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Salengro, -DRANCY-93-
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, -LES ANDELYS -27-

C.C.P.- Ligue Française Espérantiste Catholique,- ROUEN - 23 24 93 K.-

--- Abono : 4 Fr + kotizo : 1 Fr = sume = 5 Fr-

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, -LES ANDELYS -27-

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 1-a de januaro, la 1-a de aprilo, la 1-a de Julio, la 1-a de Oktobro.

*** N° 88 *** BULLETIN TRIMESTRIEL *** TRIMONATA BULTENO ************

Sankta PIO X-a, preĝu por ni.

---- Aprilo 1971 ---

## E N H A V O


| | | |
|---|---|---|
| Paĝoj : | 2 | : Libereco |
| : | 2 & 3 | : Parolas la Papo |
| : | 3 | : Pasko |
| : | 3 | : La preĝo de Nia Sinjoro Jesuo Kristo |
| : | 7 & 8 | : Kongreso 1970 -(ilustritaj paĝoj) |
| : | 4 & 5 | : Protokolo de la komitatkunveno. |
| : | 5-6-9-10- | : Raporto pri la kongreso en Orléans. |
| : | 11 & 12 | : Lingva angulo |
| : | 12 | : Anoncoj |
| : | 12 | : Nia membraro |
| : | 13 | : - 10-a Paska kultura semajno en Gresillon. |
| : | 13 | : Skribas la legantoj |
| : | 14 | : Kotiztabelo |


Venonta komitatkunveno okazos la 6-an de junio, je 15-a horo, en la florĝardeno de Vincennes.

paĝo 2

NENIO

.../...

...kontraŭ la digneco de la homa persono. Ili malnobligas la sencon kaj la imponecon de la justeco. Ili inspiras nepacigeblajn kaj kontaĝajn sentojn de la malamo kaj venĝo. Kie tio estis ebla, tie ni bedaŭris ilin kaj klopodis malkonsili la uzadon de rimedoj tiel barbaraj. La ekleziaj instancoj kaj la publika opinio de la katolikoj laŭte protestis kontraŭ tiaj maljustaj trouzoj de la potenco.

(Parolado de la 21-a de oktobro 1970)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## P A S K O

Kantu ni en laŭda ĥoro
Al Jesuo, reĝ' de gloro,
ĉar per kruco, tombo, liaj
Pardoniĝis pekoj niaj.

Nun per suferado lia
Aĉetiĝis savo nia;
Kaj li reĝas en ĉieloj
Kie kantas la anĝeloj.

( El esperanta himnaro N°62-)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## LA PREĜO DE NIA SINJORO JESUO KRISTO.

Patro nia
kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo,
venu Via regno,
fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo,
tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ,
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno kaj la potenco
kaj la gloro, eterne.

Amen.

(oficiala teksto)

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-LIGO

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO (7-3-71)

La Prezidanto, S-ro Colas, malfermas la kunvenon je la 15.15. Ĉeestas : S-ro Colas, Despiney, F-to Marmou, S-ino Vincent.

Petis senkulpigon : F-inoj Le Boëdec, Paulier, S-to Baudry, S-roj Barrier, Bessière, Ribot.

1°/- Antaŭa protokolo.

S-ino Vincent legas ĝin; la estraro unuanime ĝin aprobas kaj gratulas s-ron Barrier pro lia modela laboro.

2°/- Kongreso en Orléans.

Post legado de letero de S-to Goudé, la programo estas jene modifita :

sabaton, 27-an de marto, vespere : komuna vespero kun la kongreso de amikeco.
dimanĉon, 28-an de marto :
9.30 : ĝenerala kunveno (v. tagordon ĉi sube)
11.30 aŭ 11.45 : tagmanĝo
14.00 : Diservo
15.00 : vizito de la urbo.

Dum la kongreso estos aranĝita ekspozicio pri esperanto-gazetoj, ĉar la temo de la kongreso estos "rigardo al la katolika kaj ĝenerala Esperanto-gazetaro". Bonvolu alporti sugestojn, ideojn kaj konstruajn kritikojn.

Tagordo de la ĝenerala kunveno :

1)- morala raporto
2)- financa raporto
3)- administraj aferoj : voĉdonadoj
- ŝanĝo de la titolo de nia societo
4)- debatoj :
a)- temo de la kongreso
b)- morala raporto
5) fiksado loko kaj tempo de la venontjara kongreso
6)- konkludoj

III°/- INSTRUAJ AFEROJ.

Frato Marmou vizitis sacredoton en St-Louis d'Antin kaj ricevis bonan akcepton; la afero maturiĝas.

.../...

°°°/°°°

IV°/- INFORMADO.

La agado de S-ro Bourdeaux jam ekportas fruktojn : aperis artikolo en la "Vie catholique"; ankaŭ tiu afero maturiĝas.

V°/- DIVERSAĴOJ.

La Prezidanto legas salutleteron de W. Mudrak el Vieno. La kunveno finiĝas je la 17-a per "Patro Nia".

Protokolis J. Vincent.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Franca Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

KONGRESO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ
en ORLEANS, la 28-an de Marto 1971.

---

Protokolis F-ino Sylvie BONNET.

La kunsido okazis en la domo St-AIGNAN en Orléans. La Prezidanto malfermas la kunvenon je la 9-a kaj duono, kaj legas la salutojn de diversaj personoj kiuj ne povas partopreni.

Li anoncas la balotelekton de nova prezidanto, Pastro LONGONI, de LIMBIATE -Italio-, kaj legas leteron esprimante la salutojn kaj bondezirojn por la sukceso kaj fruktodona agado de nia asocio.

Sinjoro Prezidanto Colas salutas la partoprenantojn per kelkaj vortoj, kaj legas la moralan raporton; li varme dankas Sinjorinon VINCENT kiu estas tre sindonema kasistino de la Ligo, kaj ankaŭ redaktorino de nia ĉiutrimonata bulteno; li dankas ankaŭ Fraton MARMOU, kaj Prieuré St-Martin, kiuj estas niaj fidelaj presistoj kaj dissendistoj.

Li instigas ĉiujn anojn legi la organon de I.K.U.E., "Espero Katolika", kaj esprimi al la redaktoroj ilian opinion, ne akre, sed amike kaj frate, se ili ne estas konsentantaj kun la aŭtoroj; kaj ankaŭ, sendi si mem artikolojn ne kritikajn sed konstruemajn; ni ne faru de E.K. polemikan organon !

Sinjorino VINCENT faras la financan raporton por 1970; tiu konto estas aprobata.

°°°/°°°

.../...

ŝi prezentas la kandidatojn por la renovigo de la nacia komitato : S-ino VINCENT, S-roj VERON, TEXIER, MORIN, BARRIER. La nova kandidato estas S-ro Morin, juna Orleanano.

Oni ankaù proponis ŝanĝon de la titolo de nia "LIGO", tiu vorto havante malbone komprenatan sencon por la francaj oreloj; la proponoj estas jena :

1°/- FRANCA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

2°/- FRANCA KATOLIKA ASOCIO POR ESPERANTO

3°/- FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO

4°/- FRANĈA KATOLIKA ESPERANTO UNUIĜO

Post mallonga diskutado, voĉdono estas farita.

Jen la rezulto : 2/3 por la 3-a propono, 1/3 kontraù.

(legu la notojn de la paĝo 12-)

----- Rezulto de la voĉdono por la Estraranoj :

| | | |
|---|---|---|
| S-ro VERON | : 27 voĉoj | reelektita |
| S-ro BARRIER | : 31 voĉoj | reelektita |
| S-ino VINCENT | : 33 voĉoj | reelektita |
| S-ro MORIN | : 26 voĉoj | elektita |
| S-ro TEXIER | : 14 voĉoj | ne elektita |

TEMO DE LA KONGRESO : LA GAZETARO.

Francaj katolikaj gazetoj : parolos pri esperanto se oni ofte skribas leterojn, informojn pri esperanto-movado, kaj se oni sendas artikolojn verkitaj laù la stilo de la gazeto, aù respondojn al malfavoraj aù mokemaj artikoloj.

Espero Katolika : la kongreso petas de la redakcio de la revuo ke tiu estu verkita en pli frateca spirito. La artikoloj devas respeguli la katolikaj movadoj en la diversaj landoj, la esploroj por pli perfekta kompreno de kristanoj inter si, la progreso de la reformoj enkondukitaj laù la impulso de "Vatikano 2-a" devas havi sian lokon en la paĝoj de la revuo. Multaj ne aprobis la humorajn karikaturojn, kiuj ŝajnas atakoj kontraù la Eklezio mem al niaj nekatolikaj fratoj.

VENONTA KONGRESO : Laù propono de S-ro KRAEMER, estas proponita la urbo SARTROUVILLE apud PARIS, kaj la dato : la 1-a de majo 1972.


La kunsido estas fermita je la 10-a H. 40.

la 28-an de marto 1971.

==========================================================



KION NI FARAS POR NIAJ FRAT~~K~~OJ EN LA TRIA AGO ?



KONGRESO DE LA KATOLIKA LIGO 1970

PRIEURE St-MARTIN
LA HOUSSAYE en BRIE ( S & M )

de maldekstre: F-to Marmou, S-roj Colas Pierru F-ino Vanneau S-ino Michau, S-roj Colleu,Chapellier, infanoj kaj G-roj Kraemer, S-ino Vincentn S-ro Despiney kaj S-ro Baudry.

SALUTOJ DE LA PREZIDANTO KAJ

MORALA RAPORTO POR LA JARO 1970

Karaj Gesamideanoj,

Lastan jaron, post longa tempo sen kongreso, ni invitis la anojn de nia Asocio al kunveno en la kadro de "Prieuré Saint-Martin" en LA HOUSSAYE, kie, malgraù malfavora vetero, ni kunsidis, preĝis manĝis kaj promenadis kune. Ni decidis ke ĉiujare ni devus fari same, por konatiĝi kaj renkontiĝi malgraù la distancoj.

Dank'al la invito de niaj amikoj de Orléans, ni havas la ĝojon kunesti en la ĉarma urbo kiu bonvenas nin hodiaù, kaj ni dankas tutkore Sinjorinon MORIN kaj ŝia filon Daniel por iliaj klopodoj.

Ni dankas ankaù S-ron DELAIRE kaj volas esprimi al li kaj liaj kunlaborantoj nian plezuron, partopreninte al la hieraùa interkonatiĝa vespero, kun la "kongresantoj de l'Amikeco".

En la nomo de la ĉeestantoj, mi salutas ĉiujn malproksimajn amikojn kiuj sendis kelkajn simpatiajn vortojn okaze de tiu renkonto.

Nun, mi devas raporti pri nia agado en la pasinta jaro.

Nia komitato kunvenis ĉiutrimonate en la pariza domo de esperanto, rue de Chabrol, kaj preparas la Bultenon, kies redaktorino estas S-ino VINCENT, kaj presista Frato MARMOU. Ni dankas la personojn kiuj sendas artikolojn, kaj provizas la diversajn rubrikojn, kaj alvokas al ĉiuj por ke estu pliriĉigota la enhavo de la venontaj eldonaĵoj.

Provincoj : ni ne sufiĉe konas la aktivecon de niaj provincaj rondoj kaj anoj, kaj ni dezirus ke ĉiu bulteno enhavu eĥoojn pri ili.

IKUE. kaj ESPERO KATOLIKA.

Kelkaj kritikoj estis faritaj al nia internacia organo. La karikaturoj, kaj la kritikaj artikoloj estas malmulte ŝatataj; mokaĵoj kontraù personoj kiuj reprezentas, antaù la okuloj de la multeco, la sanktan Eklezion, ŝajnas tute malindaj. Tiuj tute ne helpas la komprenon de la profonda senco de la kristana vivo en la korpo de la katolika Eklezio, kaj malfortigas la dialogon kun aliaj familioj de kristanoj.

Tamem, ni ŝatas la bonan lingvan redakcion de la plimulto de la tekstoj. Ni bedaùras la malaperon de la pasinta presmaniero,

.../...

.../...

kaj ŝatus retrovi ĝin. Multaj personoj diras aŭ skribas al ni : ni ne plu legas E.K., la literoj estas tro malgrandaj do tro lacigaj......

EKUMENISMO. La rilatoj kun la nekatolikaj kristanoj devas esti amaj kaj fidaj; tamen ĉiu devas konservi sian propran esperonke la Sankta Spirito konas kaj inspiras la vojon al la Unueco. Komuna preĝo, por pli da kompreno de la Dia Volo, simila volo por enkonduki la gracon en nian paganan mondon; per la regno de P Paco, Amo kaj Justeco, sed la akcepto de la diferencoj, la toleremo al la diverseco de la disciplino, tio estas la unua paŝo al la plena repaciĝo inter separataj fratoj. Kaj, se ni aprobas renkontojn kun ekzemple K.E.L.I., ni konsilas ke tiuj renkontoj ne fariĝu miksaĵon, sed dialogon en kiu ĉiu restas plene li-mem.

PROPAGANDO : Dum la debatoj, ni parolos pri la gazetaro; ni invitas niajn anojn kaj amikojn partopreni en la agado por venki la silenton de la ĵurnalistoj pri Esperanto. La komitato aprobis la sendon al S-ro Bourdeaux de mono destinita al speciala agado apud la francaj gazetoj. Sed la laboro estas por ĉiuj, kaj la ĵurnalistoj aŭskultas la klientoj kiuj manifestas sin.

KONGRESOJ : F-ino BONNET partoprenis en la kongreso de Vieno; la katolikoj havis fakan kunvenon, kaj celebris Meson en Esperanto. Se multaj katolikoj estus en ĉiuj ĝeneralaj kongresoj, kaj kontaktus la katolikajn instancojn kaj movadojn, ili malfermus la pordon al la sindeteno de multaj...

En KLAGENFURT . okazis en Klagenfurt (Austrio). Ni gratulas niaj samideanojn kiuj tiel rapide kaj lerte organizis tiun renkonton post la rifuzo de la ĉekaj instancoj. Tiu manifestacio atestas la ekumenan spiriton de niaj movadoj, kaj permesas faligi la altan malfidon... Kristo benu kaj inspiru la klopodojn de tiuj kiuj serĉas komunajn ligilojn en la fideleco al la Sankta Evangelio, kaj volas vivadi laŭ la kredo kaj amo.....

Nun, ni petas S-ino VINCENT raporti pri la financa stato de nia kaso, kaj, post la administrativaj decidoj, ni debatos pri la diversaj temoj proponitaj.

==========================================================

FRANCA KATOLIKA LIGO

BILANCO DE LA JARO 1970.

| ENSPEZOJ | | ELSPECOJ | |
|---|---|---|---|
| Saldo 1-1-70 | 2.005,10 | Presado | 836,22 |
| Kotizoj | 618,90 | Korespondado | 21,72 |
| Donacoj | 212,00 | Diversaj | 69,70 |
| Rentuma ŝparkaso | 37,89 | | |
| | 2.873,89 | | 927,64 |

Saldo 31-12-70 : ....... 1.946,25

p.ĉ.k.: 508,36
ŝparkaso : 1 437,89
1 946,25

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

FINO DE LA RAPORTO ....

Komuna vespero kunigis la katolikojn kun la anoj de la kongreso pri amikeco; oni montris Fiat-filmon, rakontis anekdotojn, kantis, aùkultis muzikon.

Dimanĉon posttagmeze celebris la diservon S-to Goudé el Baugé, kiu lerta adaptis al la gregoriaj melodioj Esperanto-vortojn. Dum kelkaj tuj forveturis hejmen, la restanta grupeto vizitis la belegan kaj imponan urbdomon, renesanca konstruaĵo, kaj la domo de Jeanne d'Arc, nun kulturdomo.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## L I N G V A   A N G U L O.

Alvenis ĉifoje nur tri kontribuaĵoj el S-roj Despiney, Guillon J.M., kaj Ribot.

La tradukotaj esprimoj estis :

se recycler, avoir passé l'âge de l'école, regarder quelqu'un par dessus l'épaule.

Jen la proponoj (la substrekitaj aspektas la plej bonaj) :

1)- rekomenci studojn por alĝustiĝi al nunaj konoj (D. tro longa traduko); lernadi pli taùgan metion (G); ĝisdatiĝi, moderniĝi, sin renovigi (R).

2) esti ĉesinta la eluzon de sia pantolono sur la benkoj .../..

.../...
de la klasejo (D); ankaŭ tro longa); esti tute matura kaj plene instruita (G; ĉu vere); ne plu esti en lernejaĝo; jam de longe esti translernejaĝo (R)

3)- iun iomete malŝati (G): misrigardi, malestime konsideri, subtaksi.(R).

Novaj tradukotaĵoj :

le paon fait la roue; ouvrir le ban; avoir le don des larmes.

Kun viaj traduktoj, ne forgesu sendi ankaŭ proponojn.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

(aldono pri la kongreso en Orléans, sekve de paĝo 6-)

.../..."Laŭ la statutoj, tiu decido devas esti adoptita per la triono de la membroj de la Ligo, en esterordinara kunveno. La Estraro aranĝos perleteran voĉdonon, sed ni devas ŝanĝi diversajn presaĵojn kiam ni oficialigos la decidon; atendante, ni subtitolos la bultenon sen ŝanĝi la titolon."

==========================================================================

ANONCOJ .

- La markola kongreso okazos en Calais de la 29-a ĝis la 31-a de majo (Pentekosto). Informojn donas S-ro Ditacroute, 172, avenue de Castres, -- 62-CALAIS.-

- Informiloj por la neesperantistoj katolikoj senpage haveblaj ĉe S-ino Vincent. Bonvolu nur repagi la afrankon :

ĝis 20 ekzempleroj 0,45 Fr; ĝis 40 : 0,65 Fr; ĝis 100 : 1,25 Fr;
ĝis 225 : 1,65 Fr; ĝis 450 : 2,65 Fr;

- Karavano al Londono kaj Irlando okaze de la Universala Kongreso; de la 31-7-71 ĝis la 21-8-71; prezo : 1.945 Fr; informoj donas U.F.E., 34, rue de Chabrol,- 75-PARIS -10-.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

NIA MEMBRARO .

Novaj membroj 1971 :
1)- S-ro SAUTREUIL (Paris)
2)- F-ino ESPRIT (Hte-Marne)
3)- S-ro DELAIRE (Loiret)

Ni deziras al ili koran kaj fratan bonvenon.

Membroj bonfarantoj 1971 :
1)- S-ro LE MARQUAND (C.-du-N.)
2)- S-ro SAHATDJIAN (Meuse)

Koran dankon al ili pro ilia granda helpo.

==========================================================================

# 10-a PASKA KULTURA SEMAJNO EN GRESILLON

La 10-a Paska Kultura Semajno okazis de la 3-a ĝis la 9-a de aprilo 1971 en la kastelo de Grésillon, apud Baugé (Francujo).

20 stipendiuloj, studentoj de la Beletraj Fakutatoj de Aix-en-Provence kaj Clermont-Ferrand; 20 gelernantoj de liceoj kaj kolegioj; 30 plenkreskuloj partoprenis tiun semajnon. Japanino, du germanoj, anglo kaj dano ĉeestis ankaŭ la staĝon.

Profesoro Pierre JANTON, kiu iniciatis en 1969 la kursojn de esperanto ĉe la Fakultado de Clermont-Ferrand kun atribuo de poentoj al la universata diplomo pri lingvaj studoj, ne nur ĉeestis sed ankaŭ prelegis pri "Esperanto kaj angla lingvo". Li konkludis je la fiasko de la studo de la fremdaj lingvoj post 7 jaroj da studado, kaj deklaris, ke la sola solvo por la internaciaj rilatoj estas esperanto.

Radio, televido, gazetaro raportis pri tiu 10-a Paska Kultura Semajno kun interesaj intervuoj de P-ro JANTON.

F-ino Muriel BENAZET, S-roj Pierre BABIN, André RIBOT, Jack ROUSSEAU, Jean THIERRY, Gaston TURIN prelegis; S-ino CHEVERRY zorgis pri la ekskurso "de malnova al plej moderna tapet-arto" en la fortika mezepoka kastelo de Angers; S-roj RIBOT kaj TURIN gvidis la pedagogian parton de la staĝo; S-ro René LLECH-WALTER, Honora Prezidanto de U.F.E. estis la administra direktoro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## SKRIBAS LA LEGANTOJ.

Ni deziras ĉi tie malfermi novan rubrikon, kiu estos tribuno absolute libera por niaj legantoj. Ĉiuj ricevitaj leteroj estos publikigitaj, kondiĉe tamem, ke ili ne henavu ion ofendan por alia leganto. Bonvolu do sendi viajn opiniojn, kritikojn, sugestojn, ideojn, ĉion, kio povas interesi la aliajn. Se necese, ni respondos. Kiel por la aliaj artikoloj, atentu pri la limdatoj !

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

KOTIZTABELO 1971 -

------------

IKUE kun "Espero Katolika" .............................. 17 Fr

IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" .............................. 5 Fr

Peranto : G. Véron, p.ĉ.k.- Rouen - 11 88 63 Z -

------------

LFCE kun " Franca Katolika Esperantisto" .............. 5 Fr

infano malpli ol 16-jara .............................. 2 Fr

Membro bonfaranto .................................... 25 Fr

Dumviva membro ....................................... 100 Fr

UFE kun "Revue Française" ............................ 30 Fr

UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" ................... 46 Fr

Ligue Française Catholique Espérantiste, p.ĉ.k.- Rouen - 23 24 93 K-

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££

Dépôt légal : 2° trimestre 1971 /// Polycopié par : F.M.C.

Papier de Presse : N°-34.745- /// Prieuré St-Martin

Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE

/// 77- TOURNAN-en-BRIE

FRANCE

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§